

ESPERANTO KAJ DEMOKRATIO

VERDA MAJO

Pri « Verda Majo », Hasegawa Teru, japana aktivulino, bonvole legu en www.eo.wikipedia.org.

Bonvole konsideru, ke ŝi skribis tiun tekston en la jaro 1943.

« Kion vidis en Cara Rusio la juna sentema Zamenhof? Avantaĝon de l'grandrusoj, subpremon al la aliaj nacioj, precipe la murdon de l'judoj, - kaj eble ankaŭ perfektan senrajtecon de l'popoloj inkluzive la grandrusan. Ĉu ĉi ĉio iel diferencas de l'agoj de l'germanaj kaj japanaj invadistoj? En la koro de Zamenhof flamis furio kontraŭ la despotoj, buĉistoj, aspiro al la paciĝo, familiiĝo de l'tuta homaro. Li kreis Esperanton dezirante ke ĝi utilu por la egaleco kaj sendependeco de ĉiuj nacioj grandaj aŭ malgrandaj, fortaj aŭ malfortaj.

Do, denaske kaj nature Esperanto estas demokrata, antifaŝista, kvankam tiutempe oni ankoraŭ ne uzis tian esprimon. Sed, supozu: kiel kurba ĝi fariĝus, se dum la kreskado ĝi ne laŭirus la vojon demokratian? Feliĉe, la saĝa kaj amoplena Zamenhof tre frue deklaris, ke li nur estas ĝia kreinto, li havas nenian rajton nek privilegion por ĝi, ĝi apartenas al la popolo ĝin uzanta, kaj ĝi evoluu inter ili.

Jes, Esperanto ne estas propraĵo de Zamenhof, sed de l'publiko. Oni ne bezonas nek devas blinde obei kaj alteniĝi al la vortaro kaj stilo. Esperanto ne estas rusa nek angla nek eŭropa, ĝi estas internacia. Tial ankaŭ ni orientaj esperantistoj havas rajton kaj devon aktive antaŭenpuŝi la movadon. Kaj efektive ni tion faris kaj estas farantaj. (...)

Esperanto estas tutece demokrata. Do la Hitleranoj konsekvence malamikas al ĝi. Post ilia pereco, nome post finiĝo de tiu ĉi milito la demokrata Esperanto en la demokrata mondo trovos sian bonan grundon kaj kreskos pli rapide kaj riĉe. Por tio tamen necesas nia konstanta pli bona laboro, ĉar neniu venko mem venas al ni. »

(El *Lernilo de Esperanto* n-ro 11-12; nov.-dec., 1943)

El la libro « Verkoj de Verda Majo » Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982

Je kies nomo

Tibor Sekelj

El « Kolektanto de ĉielarkoj »

Reĝido sub arbo sidis

Longajn jarojn.

Subite li klare vidis

Darmon kaj karmon.

« Faru bonon. Regu modero.

Via reenkarriĝo pli fora, pli glora. »

Li deklaris je l'onomo del vero,

la sola vero sur tero.

Tra liaj vortoj la homoj sentis

La veron. Ili obeis.

Ili ne plu oferis. Sin ne turmentis,

feliĉaj ili vivis

je l'onomo de l'vero...

ne plu en mallumo drivis.

Barbulo grimpis monton

Dek literojn li ĉizis en ŝtonon.

Revene li proklamis je nomo dia :

« Ĉesu murdado plia,

ŝtelado ĉesu, ne plu kokru,

aliajn diojn ne adoru ! »

La homoj akceptis la diajn admonojn :
detruis idolojn, ne plu murdis homojn,
fidelis al siaj edzinoj senvorte,
ĝismorte.

El trogo leviĝis senhelpa infano
kun mano malforta, buŝo malmultvorta,
en la mondon li ekiris.
« Amu kiel vin mem, vian najbaron »,
je l' nomo de sia patro, dio, li diris
kaj « post vangofrapo montru la alian vangon.»

La homoj lin kredis, en amo lin sekvis
kaj montris la vangon eĉ sen antaŭa frapo.

Kamelgardisto vagadis tra dezertoj
Meditis longe, kolektis spertojn
Kaj eldiris leĝojn je dia nomo,
Kiujn devas ĉiu homo obei :
« morton al ĉiuj kiuj kuraĝas nei ! »
Kaj ekmoviĝis sankta milito
kun arda fervoro kaj obstina spito
por venki aŭ pere! !

Ankaŭ mi grimpis monton kaj sub arbo sidis
kuŝis en trogo, perditajn gvidis,
meditis en dezerto pri akiritaj spertoj.

Kien ajn mi iras, mi diras :
« vivu en paco, ne plu militu.
Panon disdonu, ne plu ŝetu bombojn,
Bomboj kreas mizeron, dum dolĉas la pano !
Homoj... estu homoj ! »

Mi krias kaj petas, ĝisraŭke ripetas,
Senrezulte : ili plue bombojn ŝetas
Urbojn detruas, animojn skuas.
Por peco da pano skeletoj vicostaras
Kaj kie ĝi abundas, pano amaras.
...Ĉar finfine... je kies nomo mi krias
naivulo romantika ?

Eĉ mi mem ne scias !

28.12.1987